************************************************************************************

INSTRU-CIRKULERO 2021/01 (oktobro 2021)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

************************************************************************************

*Per tiu ĉi informilo ni peras interesaĵojn pri instruado, pri eventoj rilate al kursoj, klerigado kaj alvokojn, novaĵojn.*

Karaj Gekolegoj,

post la pandemia jaro 2020 ni ĉiuj esperis je pli bona, agadplena jaro 2021, sed ni jam povas konstati, ke nek tiu jaro donis al ni la eblon je la kutimaj agadoj, eventoj. Mi provadis dissendi porokazajn retmesaĝojn, ke nia membraro restu informita pri en- kaj eksterlandaj novaĵoj. La jarraporton kaj la financan raporton vi trovas aldone kaj ankaŭ sur nia retpaĝo https://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652; al niaj membroj sen retadreso mi sendas la dokumentojn per poŝto.

Per tiu ĉi letero mi invitas vin al nia jarĉefkunveno, kiun ni devis denove forŝovi de la kutima dumpentekosta periodo al la aŭtuno. Ni esperas, ke vi povos ĉeesti, se ne persone, tiam almenaŭ virtuale, ja ni organizos la kunvenon en tn. hibrida formo, ebligante partoprenon per Zoom, do vi povos aŭskulti, demandi, kontribui. Se vi havas iun rimarkon, aldonendaĵon al la tagordo, kompletigon, peton, bv. kontakti min laŭeble ĝis 24.10.2021 per retmesaĝo al zsofia.korody@esperanto.de.

## Einladung: VDEL-AGEI Mitgliederversammlung

Der Verband Deutscher Esperanto-Lehrer (VDEL-AGEI) lädt zu seiner jährlichen Mitglieder-versammlung in Osterode am Harz ein.
Diese findet **am Samstag**, den **30.10.2021** in Gaststätte Freiheiter Hof, Hauptstraße 9, 37520 Osterode am Harz, http://freiheiterhof.de statt. Beginn ist um **13:30 Uhr**.
Neben Berichten über die Arbeit des vergangenen Jahres sind Diskussionen über die weitere Arbeit des Verbandes zu erwarten und ausdrücklich erwünscht. Der Vorstand erwartet daher eine rege Teilnahme der Mitglieder.

## Invito al: Jarĉefkunveno de AGEI

La Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) invitas ĉiujn siajn membrojn al la ĉi-jara ĉefkunsido, okazonta en Osterode am Harz. La AGEI-kunveno komenciĝos je **13:30 en sabato, la 30an de oktobro 2021 en la restoracio Freiheiter Hof, Hauptstr. 9, 37520 Osterode am Harz**, http://freiheiterhof.de/.

Proponata tagordo:

1. elekto de la gvidanto de la kunsido. Salutado, malfermo.
   Elekto de protokolanto, kontrolo de laŭstatuta invito kaj decidpovo
2. decido pri la tagordo
3. raportoj de la kasisto kaj la kasrevizoroj
4. raporto de la estraro. Malŝarĝigo de la estraro
5. informado, diskutado pri instruado per interreto
6. planoj por lerneja instruado de Esperanto kaj instruista trejnado
7. pluaj aktivecoj kaj proponoj
8. laborplano por la sekva agadjaro. Decido pri loko kaj dato de la sekva jarĉefkunveno.
9. diversaĵoj

Por tiuj, kiuj ne povos ĉeesti, ni provos doni alireblon per ZOOM.
Temo: **AGEI jarĉefkunveno**; tempo: en sabato, okt 30, 2021 13:30 PM (Tempozono: Amsterdam, Berlin, Rome)
Rekta ligilo al la Zoom-ĉambro: **https://us02web.zoom.us/j/88196998044** (sen pasvorto)
Meeting ID: 88196998044
Koran bonvenon! Kun multaj salutoj kaj danko al ĉiuj, kiuj per membreco kaj agado subtenas nian asocion,

Zsófia Kóródy
AGEI-prezidanto